

En la ĉi-jara printempo aperis **Sciencaj Studoj**, originalaj artikoloj de esperantistoj-sciencistoj, bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj, eldonitaj de ISAE jubilee okaze de sia 50-jara — cetere ne-seninterrompa — ekzisto. La libro, en formato de 18 x 26 cm², presita sur bona papero, havas ĉirkaŭ 240 paĝojn. Ĝin redaktis D-ro Paul Neergaard. Antaŭparolon verkis la prezidanto de ISAE, Prof. S. Nishi. Ornamis ĝin per kelkaj belaj vinjetoj Mads Stage, kies laboron ni jam konas el *La Vivo de la Plantoj*. Dekunupaĝan „retrospektivan rigardon al 50 jaroj da apliko de Esperanto en la scienco” skizis la redaktoro de la volumo. Ĝi traktas la historion de ISAE, kaj ĝin ilustras portretoj de tiuj kiuj ludis gravan rolon en ĝi: Generalo H. Sébert, d-ro A. Schmidt, Prof. d-ro J. J. Thomson (nobelpremiito), d-ro R. Benoit, Prof. d-ro E. V. Huntington, Prof. d-ro W. Förster, Prof. d-ro A. Cotton, Prof. d-ro O. Bujwid, Prof. d-ro M. Fréchet, Prof. d-ro S. Nishi, Ing. M. Rollet de l'Isle, kaj C. Støp-Bowitz.

Sekvas unue la „Parto Humanisma” 96-paĝa kun 15 artikoloj de 15 aŭtoroj el 13 landoj kaj kun 13 naciaj lingvoj, kaj poste la „Parto Matematika-Naturscienca” 116-paĝa kun 21 artikoloj de 21 aŭtoroj el 11 landoj kun 11 naciaj lingvoj. Entute la 36 aŭtoroj estas el 19 landoj kaj havas 15 (aŭ 16?) gepatrajn lingvojn (6 parolas la japanan, poe 4 la anglan, la francan kaj la nederlandan, 3 la suoman, poe 2 la germanan, la hispanan, la norvegan, la serbo-kroatan, kaj la svedan, kaj poe 1 la bulgaran, la ĉinan, la danan, la italan, kaj la rusan. La aŭtoroj estas azianoj, eŭropanoj, nord- kaj sud-amerikanoj, kaj novzelandano. Ĉi tiu libro do ĉiel atestas pri universaleco. Se ĝi bone vendiĝas kaj se sin anoncas sufiĉe da abonantoj *Sciencaj Studoj* povos aperi periode — ekzemple ĉiudujare. La prezo estas \$ 5.— por volumo. Ne tro granda financa ofero tio estus por la sciencistoj-esperantistoj, mi opinias. Tia periodaĵo certe helpos nin disvastigi la Internacian Lingvon en la medioj de sciencistoj. Do, se vi ankoraŭ ne aĉetis la nunan volumon, tuj tion faru, kaj leginte ĝin konstata ke tia entrepreno meritas vian subtenon, kaj anoncu ke vi pretas aboni estontajn volumojn.

Cetere, kvankam estas en ĝi kelkaj artikoloj kiuj estas legeblaj kaj kompreneblaj nur por fakuloj-specialistoj, la plimulto, ankaŭ el la natursciencaj artikoloj estas en ĝeneralaj trajtoj kompreneblaj kaj interesaj ankaŭ por nefakuloj, eĉ se ĝenerale ili estas verkitaj unuavice por la samfakanoj. Ni provu ja ne tute droni en niaj specialaĵoj, kaj ni uzu i.a. *Sciencajn Studojn* kaj *Sciencan Revuon* kaj niajn ĝenerale kulturajn kaj literaturajn gazetojn por savi nin de tia drono!

La lingvaĵo, kiun mi ne volas ĉi tie kritiki detale, ne ĉiam estas senmakula. La marĝenoj de mia ekzemplero restis preskaŭ puraj ĝis

p. 70, kaj ĉe ankoraŭ deko da aliaj artikoloj kritikaj notoj tute aŭ preskaŭ tute mankas. Tamen, ĉe aliaj ili tro abundas. Parte ili apartenas al eraroj, kiujn mi jam tuŝis en S.R. 10 35; al ili mi do nun ne revenas. Kelkaj estas evidentaj preseraroj. Ĉe 5 aŭ 6 aŭtoroj la lingvuzo estas nepre sub la nivelo kiun ni devas postuli. Eraroj kiuj troviĝas ĉe pluraj aŭtoroj estas „ne ankoraŭ” anstataŭ „ankoraŭ ne” kaj — sub naci-lingva influo — „korespondi” (pp. 123, 153, 175, 176) anstataŭ „respondi” (aŭ foje „interrespondi”). La ĝusta termino por „occurrence” ne estas „ekzisto”, sed „troviĝo”. Eraro ofte farata estas ankoraŭ la pleonasma „pli poste” anstataŭ „poste”. Ŝajnas al mi ke ni ne diru „freŝakva” (kiel la uzantoj de la angla lingvo) nek „dolĉakva” (kiel la uzantoj de kelkaj aliaj naciaj lingvoj), sed prefere precize trafe: „nesalakva”. Mi notu ke „efekto” ne estas taŭga traduko de la ofta vorto „effect” en natursciencaj tekstoj. Tiam temas pri „fenomeno”, kaj oni uzu tiun vorton. Ni povas paroli pri *natria* kaj *kloraj jonoj*, aŭ pri *natrio-* kaj *kloro-jonoj*, resp. *Na-jonoj* kaj *Cl-jonoj*, sed se ni ne uzas adjektivon, ni nepre uzu streketon. Ankaŭ „oksigeno atomoj” kaj „Ti atomo” (p. 161) ne estas ĝustaj formoj.

Fine mi volas permesi al mi ankoraŭ kelkajn nelingvajn kritikojn. Ŝajnas al mi ke „koloro” tute ne estas fizika nocio (p. 163): unu sama koloro povas esti la rezulto de lummiksaĵoj kun tute malsamaj spektraj distribuoj; pri koloro ni povas nur tial paroli, ĉar la normala homa okulo perceptas kolorojn. Rilate al la artikolo de s-ro Rosendahl (dua duono de p. 151) mi rimarkigu ke la formulo por la potenciala energio ne estas ĝusta; la potenciala energio ne estas la produto (ne: *produkto*) de la maso *m* kaj la premo *h*, kiel asertas la aŭtoro, sed la produto de premo kaj volumeno.

— W. P. R.

413.164 = 089.2 = 397 : {69 + 72}

K. J. Moberg: **Konstruteknika Terminaro**; 1-a Parto: Sveda-esperanta; 2-a Parto: Esperanta difinvortaro. Formato A5 (148 x 210 mm²), 100 paĝoj. Prezo: broŝurita 7,50 sv.kr.; en plasta bindaĵo (por fakuloj) 8,50 sv.kr. Eldona Societo Esperanto, Box 7043, Malmö 7, Svedujo.

Jen centpaĝa, utila libro por konstrufakuloj aŭ eĉ por tiuj kiuj deziras, pro diversaj kaŭzoj, konatiĝi kun konstrutermoj. Kvankam pli ol duono de la libro estas dediĉita al tradukoj de svedaj vortoj en Esperanton, la cetera parto de la libro donas klarigojn de terminoj en Esperanto kaj tradukojn en kelkajn naciajn lingvojn. Precipe por ni en Usono estas agrable trovi tradukojn ne nur en la anglan lingvon, sed krome laŭ la Usona uzado.

Unu vorto kiu mankas estas „betono”, kiu estas unu el la plej uzataj materialoj en la konstrumetio. Ankaŭ ŝajnas al mi ke kelkaj vortoj

estas superfluaĵoj pro la fakto ke tute ne necesas klarigi ilin. Ekz.: bonigi, falinta akvo, pluvakvo. Ĉi tiuj vortoj havas la samajn signifojn ekster la konstrufako.

La bonaj desegnaĵoj aldonitaj al la libro pliklarigas kelkajn pli komplikitajn nociojn. Pro tio la libro havas pli da internacia utileco ol ordinara terminaro havus.

La posedo de ĉi tiu konstruteknika terminaro estas rekomendita por ĉiuj kiuj interesiĝas pri la konstrua fako, ne nur profesiuloj, sed ankaŭ laikoj. — Francis E. Helmut h.

615 = 089.2

Samideano C. Pimentel (Brazilo) publikigis artikolon en **Publicações Farmacêuticas** 12 N-ro 67 (1957) artikolon sub la titolo „**O Esperanto e a Terminologia Químico-Farmacêutica**” en kiu li polemike pledas por uzado de Esperanto anstataŭ latino en la kemia-farmacia terminaro. Tamen lia propono ke la oficiala farmacia nomo de medikamento estu tiu elektita de la persono aŭ firmo kiu eltrovis ĝin aŭ unue ĝin ekvendis, ŝajnas ne tre oportuna, pro du kaŭzoj:

1. ordinare tiaj nomoj estas leĝe ŝirmitaj marknomoj, per kiuj oni ne rajtas indiki la produktaĵojn identajn de alia deveno;

2. se temas pri unuopaj kemiaĵoj, oni prefere uzu laŭsistemajn nomojn, ĉar la multegaj fantaziaj nomoj estas terura ŝarĝo por la memoro de la kemiistoj.

— W. P. R.

= 089.2 = 52(048) : 52(05) = 945.41(471.1)

Tähtitaivas, 1956, N-ro 16, 23 p. Suoma (amator-)astronoma gazeto.

621.(048.1) = 089.2 : 621(05) = 50

La itala revuo pri mekanika inĝenierarto „**Ingegneria Meccanica**” (via Fantoni 14, Milano) publikigas mallongajn resumojn de siaj originalaj artikoloj en franca, angla, germana kaj esperanta lingvoj. La supersignoj de la franca kaj germana lingvoj ne kaŭzas malfacilaĵojn; tiuj de Esperanto ankoraŭ mankis en la numero de Januaro de ĉi tiu jaro. Ankaŭ la lingvaĵo bezonas ankoraŭ plibonigon. En n-ro 3 (marto, 1958) aperis sespaĝa artikolo de inĝ. P. Marelli sub la titolo „Le lingue contro la scienza” (La lingvoj kontraŭ la scienco) en kiu li analizas la problemon kaj pledas por la ĝenerala uzo de Esperanto. Inĝenieroj esperantistaj estas invitataj peti ekzempleron de ĉi tiu revuo ĉe la supre indikita adreso.

— W. P. R.

Raportoj de Ŝtata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp, Svedio en la sveda lingvo kun resumoj en la angla kaj en Esperanto.

Klasifikantaj testoj pri legomoj 1951-1954 (R. Lamm, G. Tometorp kaj H. Åvall), n-ro 90, 54 p.

Testoj pri varioj kaj baztrunkoj de pomo en Alnarp 1941-1954 (E. Johansson) n-ro 91, 21 p.

Testoj pri varioj kaj baztrunkoj de prunoj en Rånna 1939-1941 (S. Hintze) n-ro 92, 7 p.

Testo pri rikoltotempo de konservpizoj (H. Åvall kaj S. Hintze), n-ro 93, 19 p.

Lokaj testoj pri sterkado ĉe forcadtomato (R. Lamm) n-ro 94, 26 p.

Variotestoj pri nigra ribo (*Ribes nigrum*) (E. Johansson) n-ro 95, 19 p.

Vario- kaj baztrunko-testoj pri *polyantha*-rozoj ĉe Alnarp 1948-1955 (S. E. Lenander) n-ro 96, 32 p.

Testo pri rulvitro por varmbedoj en Alnarp (H. Åvall) n-ro 97, 14 p.

Klasifikantaj testoj pri legomoj 1952-1955 (R. Lamm, S. Hintze kaj H. Åvall) n-ro 98, 26 p.

Variotestoj pri framboj en Norrland (I. Fernqvist) n-ro 99, 25 p.

Interspaco- kaj pritrancadtesto pri tomato (R. Lamm) n-ro 100, 15 p.

Esploroj pri fekundigcirkonstancoj de fruktvarioj en Alnarp 1945-1955 (E. Johansson) n-ro 101, 56 p. — G. F. M.

Konsuma enpakado de legomoj (H. Åvall) n-ro 102, 46 p.

Transportotestoj pri ĉerizo (I. Fernqvist) n-ro 103, 24 p.

Testoj pri sterkado de groso (*Ribes grossularia*) (E. Johansson) n-ro 104, 14 p.

Testoj pri cepo (Variotesto kaj konservadtesto pri maleinhidrazido) (S. Hintze kaj H. Åvall) n-ro 105, 19 p.

Klasifikantaj testoj pri legomoj 1954-1956 (R. Lamm, S. Hintze kaj H. Åvall) n-ro 106, 28 p.

Vario- kaj baztrunk-testoj pri pomo en Blekinge, Svedujo (E. Johansson) n-ro 107, 11 p.

Vario- kaj baztrunk-testoj pri prunoj en Alnarp (E. Johansson) n-ro 108, 20 p.

Variotestoj pri frago 1950-1956 (H. Sahlström) n-ro 109, 28 p.

Klasifikantaj testoj pri legomoj 1955-1957 (R. Lamm, S. Hintze kaj H. Åvall) n-ro 110, 39 p.

Testoj pri tenado de blanka brasiko (Å. Nyhlén), n-ro 111, 23 p.

Variotesto pri frago en Öjebyn 1954-1957 (G. Larsson) n-ro 112, 9 p.

Vario- kaj baztrunko-testoj pri pomo en Svedujo 1942-1957 (E. Johansson) n-ro 113, 40 p.

Testoj pri sterkado de karoto kaj ruĝa beto en Svedujo (R. Lamm kaj S. Hintze), n-ro 114, 16 p. — W. P. R.